

sed la kvanto, kiun li povis estiĝi estis nur tre eta, kaj li ne povis akumuli provizon, ĉar oni ankoraŭ ne eltrovis metodon por ĝin konservi. Do pluraj jaroj forpasis, antaŭ ol la eltrovo estis utiligebla. Kvankam, por ke ili faru eltrovojn, estas dezirinde ke sciencistoj estu kiel eble plej liberaj kaj sendependaj, estas ankaŭ dezirinde, por tuj utiliĝi eltrovojn, ke spertuloj pri plurnaraj sciencoj kunlaboru. Por solvi la problemon, kiel ekstrakti la penicilinon sufiĉe grandskale, estis necese, ke unu el la kunlaborantoj estu lerta kemiisto, kaj post kiam pluraj sciencistoj malsukcesis, la problemo estis solvata en la jaro 1928 de du kemistoj en Oxford, profesoro H. FLOREY kaj d-ro CHAIN. La unua estis Australiano, kiu venis al Oxford pro tio, ke li gajnis unu el la stipendioj de RHODES; la dua estis Juda refuĝinto el Germanujo, (do lia nomo prononciĝu kiel „Ĥajn”).

Poste ambaŭ partoprenis kun Fleming ĉe la aljuĝo de unu el la premioj de NOBEL. Tamen ne ĝis la jaro 1942 estis paciento en Britujo sukcese kuracita per penicilino, kaj alia en Usono. Dum la milito la tuta kvanto de ĝi en la tuta mondo estis nur eta, (apenaŭ sufiĉa por savi la vivon de unuopa paciento), do ĝi ne estis aĉetebla, kaj oni permesis ĝian uzon nur en okazoj de granda bezono. Ne ĝis la milito jam finiĝis, la publiko sciigis, kiel multe da vivoj, kaj kiom da doloro per ĝi estis ŝparita. Kaj ne ĝis tiam oni povis komenci la fabrikadon de la penicilino kaj similaj drogoj pogrando je komerca skalo. Kaj ne ĝis tiam Fleming kaj liaj kunlaborantoj ricevis la honorojn, kiujn ili meritis.

La recenzata verko ankaŭ prezentas la tutan historion pri la lastatempa progreso de la medicino, kaj la principojn, kiujn ĝi ilustras. Precipe grava estas la 11-a ĉapitro, en kiu oni diskutas kun multaj citaĵoj la esencajn ecojn, kiuj karakterizas „la grandan scienciston”. Laŭ la konata scienca ĵurnalisto, S-ro CHAPMAN PINCHER, la jenaj ecoj nepre troviĝas pli aŭ malpli ĉe ĉiuj plej eminentaj sciencistoj:

- (1) scivolemo.
- (2) envido („insight”); t.e. la kapablo kapti la kernon de problemo: ekzemplo NEWTON.
- (3) inĝenieco (ĉe la elpensado de eksperimentoj), ekz. lordo RUTHERFORD. Fleming ankaŭ memoriĝis pro tio, ĉe siaj kolegoj, eĉ se li neniam fariĝus fame konata ĉe la publiko.
- (4) persisto, ekz.: S-ino CURIE.

De la unua eco oni ne mencias ekzemplojn, sed multaj venas en la menson. Ĝi estas precipe rimarkinda ĉe pioniroj, ekz.: Leonardo da Vinci, Galilei, Gilbert White, Franklin, Clerk Maxwell.

Ĉi tiu biografio finiĝas per listo de la sciencaj artikoloj, kiujn li verkis; la unua presiĝis en la jaro 1908. Post tio troviĝas indekso.

T.L.C.B.

La imitado de Kristo far Thomas Hemerken a Kempis; Esperantigita de Frato Wigbertus Van Zon L.K. „Antoine” Geertruidenberg (Ned.) 1952. 15 × 10 cm², 335 p.; prezoj: luksa 4,50, popul. 3,50 gld. Nederl.

Recenzante tradukajon oni povas atentigi pri du aspektoj de la libro: oni recenzas la enhavon de la libro, aŭ la traduklaboron, aliel dirite, mi povas recenzi la verkon de Thomas aŭ la laboron de Van Zon. Mi provis plenumi ambaŭ taskojn. Ĉi tie donas mi recenzon pri la lingvo de la tradukaĵo, en alia numero de Sc. Rev. troviĝos recenzo pri la enhavo sub la titolo: *Prepozicia vivo*.

Sendube estas malfacila tasko traduki libron. Speciale la konciza stilo de Thomas supoze donis multajn venkendaĵojn. Kredeble ĝenerale sukcesis la tradukinto, mi ne kontrolis tion.

Jen kaj jen estas malpli bonaj tradukaĵoj. Ofte oni sentas influon de la Latina. La plej stranga formo troviĝas sur p. 110: „En la kruco estas savo ... en la kruco infuzado de ĉiela dolĉeco”. La Latina „infusio” signifas „enverso”; infuzade ni preparas teon kaj kafon.

Jen kelkaj aliaj ekzemploj: „Neniu homo estas tute libera de tentoj, tiel longe ke li vivu” (kiel li vivas; p. 33). Ofte uziĝas „ke” anstataŭ „kiel”, kaj kelkajn fojojn u-modo anstataŭ indikativo.

Kelkfoje oni trovas „juste” anstataŭ „ĝuste” (ekz. p. 45) aŭ „rekta” anstataŭ „ĝusta” (p. 197). Strange estas ke sur p. 86 kaj kelkaj aliaj paĝoj ripete troviĝas „humiliuloj” anstataŭ „humiluloj”; la Latina adjektivo estas „humilis”. Sur p. 149 troviĝas „ekzercitata” anstataŭ „ekzercata”; la Latina formo de „ekzerco” estas „exercitium”.

Sur p. 160 ni legas: „Filo, tiel vi devas esti disponata, se”. La Latina „disponere” havas pli da signifoj ol nia „disponi”. Ĉi tie mi preferus: „tiel vi devas esti aranĝata”, aŭ eĉ pli libere: „tiel vi devas stati”.

Uziĝas „maljuna homo” sur p. 166, kie la ĝusta formo estas „malnova homo”, ja temas pri la homo dum lia pekemo. Sur p. 244 „materiala” devas esti „materia”. Sur p. 315 mi preferus „docento” ol „doktoro”.

Speciala kaptilo por tradukantoj vidiĝas sur p. 253. En la Latina la vortoĵo havas seksajn genrojn, kiuj mankas en Esperanto. La vorto „gratia” (graco) estas ina vorto (vortino?). Pri ĝi legas ni sur p. 253: „Ĝi estas instruantino de la vero”. Pli bona traduko estus „Ĝi estas instruanto pri la vero”, ankoraŭ pli bona „ĝi instruadas pri la vero” („estas instruisto pri la disciplino” ktp.).

Alia danĝero ĉe lingvuzo estas ke oni volas diri ĉion kion oni scias; oni ne povas silenti pri malgravaĵoj. Ĉi tiu danĝero nune pezigas la lingvon Nederlandan; male ne la Anglan laŭ mia scio. Ekzemplo de tiu emo estas la vorto „piedenkatengita” sur p. 195, kie „piedkatengita” sufiĉas. „Kateni” ja ne povas havi alian signifon krom „enkatenigi”.

Kelkaj lingvoj havas strangajn kutimojn pri la uzo de la vorto „ne”. Tiam strangajon ni trovas sur p. 282: „kiel grandan piecon nun ne devas havi mi ... en deesto de la Sankta Sakramento”. Pli bone ol „ne” estus „ja” aŭ „do”. Ne eblas indiki ĉiujn erarojn: ofte oni ne scias ĉu estas mistraduko aŭ pres-eraro (ekz. „abomindaj” sur p. 308: „abomenindaj”). Preseraroj ne mankas, supoze mi vidis kelkdekon. Inter ili ripetajn, ekz. „inteligo” anstataŭ „interligo”. Ĉu Latina influo? El sia „interlego” tiu lingvo faris „intelligo” mi komprenas: komparu nian „intelektu”).

En la libro mankas listo pri la novvortoj. Mi donu kelkajn kaj provu ĝuste indiki la signifojn. Se mi mistrasas iun, oni almenaŭ sciu ke la teksto ne estas klara.

Mortifiki: La nocio estas parenca al mortigi. La termino uziĝas pri homaj inklinoj: mortifiki inklinojn, dezirojn. La termino ne estas necesa; se oni volas eviti „mortigi” uzblas „malvivigi”.

Kontempli: La nocio estas parenca al „pripensi” kaj „rigardi”. Oni povas difini „anime mergi sin en strukturon stabilan”. Imagu malnovan kastelon, ne plu uzatan. Rigardu ĝin, rigardadu ĝin. Ĝuu ĝiajn belecon kaj gracion. Tutan tagon rigardu, tutan semajnon, — ne elvenos grandsinjoro. Tia sinokupo fariĝas kontemplado.

Krom „kontempli” troviĝas „kontemplativa”; tiu vorto estu „kontemplema” aŭ „kontempla”. Ni ne tro riproĉu, en nia oficiala vortaro ne mankas tiaj evitindaĵoj.

Mizerikordo: La nocio estas parenca al „kompato”, „indulgo”. Mi ne scias la diferencon. Grandan varion da vortoj bezonanto povas uzi: kompatkoreco, malpunemo, pardonemo, malsevero. Do la novvorto ne necesas.

Penitenco: La radiko estas parenca al nia „pento”. Ĝi signifas pentagon, pentajon, aŭ ion tian. Pli precize mi ne scias.

Skandalizi: La vorto estas Grekdevena; la koncerna substantivo signifas kaptilon, ekfunkciantan se iu bastoneto falas. Anstataŭ „skandalizi” mi preferus „falkapti”. La preciza signifo ne estus, ke iu estas kaptata ĉar io falas, sed ke iu falas morale, ĉar li estas kaptata morale. Tiele evoluis la signifo de la Greka vorto. Nia vorto „skandalo” indikas ke la onidiro povas kaptaĉi iun. Tio estas plua evoluo.

Malkrom „kontempli” ŝajnas al mi nenecesaj la novvortoj.

Ne kontentigas min la vorto „kordispremigo”. Imagu la dissaltantan koron sub fingra premol! Preferus mi „koropecigo”. (Laŭ Thomas koropecigo estas koropacigo).

Malgraŭ la mankoj ŝajnas al mi ke ĝenerale la tradukinto bone sukcesis. Ofte la lingvo estas flua kaj dolĉa.

G. Hamming.

ISAE-INFOJMOJ.

Nova komitatano. D-ro Paul Neergaard estas elektita de la danaj membroj komitatano de ISAE.

Nova delegito por Germanujo okcidenta: Dipl. ing. Rudolf Haferkorn, Königseer Strasse 50/o, (13b) Berchtesgaden. Li estas komitatano de ISAE kaj sekretario de la germana ISAE-sekcio. Lia ĉefverko estas manuskripto de *Scienca kaj Teknika Terminaro (STT)*.

Al la malnova delegito, D-ro Curt Dehli, ni esprimas nian sinceran dankon. Certe li ŝatigos la laboron en nia rondo. Li estas la alia verkinto de STT. La germana sekcio per tio multe kontribuis al nia terminologia laboro.

La aŭstra delegito informas: Fil. d-ro Karl Ammer el Aŭstrujo, membro de ISAE, fariĝis profesoro en la Universitato de Halle, Germanujo. Ni gratulas.

Jarkotizo 1955. La kotizo estas por aktiva membro (kun revuo) 12 anglaj ŝilingoj, por aprobanto (sen revuo) 2 ŝil., por abonanto 10 ŝil. En diversaj valutoj la kotizo por aktiva membro estas:

Argentino 25 pesoj, Aŭstrujo 40 ŝilingoj, Belgujo 85 frankoj, Brazilo 30 kruzejoj, Britujo specialaj kotizoj, Danujo 12 kronoj, Finnlando 400 markoj, Francujo 600 frankoj, Germanujo 7 markoj, Hispanujo 65 pesetoj, Italujo 1000 liroj, Japanujo 600 jenoj, Jugoslavio 500 dinaroj, Meksikio 14 pesoj, Nederlando specialaj kotizoj, Norvegujo 12 kronoj, Svedujo 9 kronoj, Svisujo 7.50 frankoj, Usono 2 dolaroj.

Bonvolu sendi kotizon al via delegito.

Deziras korespondi S-ro Hazime Kusumoto, asistento ĉe Instituto de Scienco kaj Teknologio, Tokyo-Universitato, Meguro-ku, Komaba 856, Tokio, Japanio, pri egaj polimeroj („high polymers”).

La Sekretario.

ENHAVO:

paĝo

Honoraĵo al HENRI POINCARÉ — S. Nishi, C. Stop-Bowitz kaj I. Lapenna	121
Restarigo de la statistika koncepto pri meza homo — M. Fréchet	122
La prepozicio ĉe la pasivo — A. Albault	136
La termajstro. La lumbriko la senlaca helpanto de la terkulturistoj — C. Stop-Bowitz	139
Iom pri la scienca laboro ĉe Ŝtata Hortikultura Eksperimentejo en Alnarp. Akarp. Svedujo — C. A. Klang	146
„La reĝina substanco”; la bazo de la socia instinkto de abeloj — C. G. Butler (T.L.C.B.)	149
Recenzoj kaj bibliografio	150
Fleming, la eltrovinto de la penicilino — L. J. Ludovici (T.L.C.B.) ...	150
La imitado de Kristo — T. H. à Kempis (G. Hamming)	153
ISAE-informoj — La Sekretario	155
Indeksoj pri la volumoj 5 kaj 6	156